

Pri la ĉerokoj laŭ Billy WALDON (Vilĉjo Valdon)
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 majo 19 kaj 21.

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Antaŭ tri jaroj juna indiano el Usono, kies nomo estas [Billy WALDON](#), partoprenis semajnfinojn, kiun Kultura Centro Esperantista dediĉis en La Chaux-de-Fonds al la lingvaj minoritatoj. Li venis rakonti pri la ĉeroka lingvo kaj pri ties similaĵoj al la zamenhofa. La publiko estis vigle impresita pri la plorinda situacio de tiu indiana popolo. Poste ni ne plu aŭdis paroli pri tiu ĉeroko, kiu daŭrigis sian vojaĝon tra esperantujo. Kaj antaŭ kelkaj tagoj ni subite ricevis vivsignon: samtempan anoncon, ke naskiĝis la organo [La Ĉeroka Esperantisto](#) kaj ke Billy WALDON troviĝas enkarcerigita. Tiu indiano bone sciis, ke raporti ekster Usono pri la drama situacio de la propra gento estas kontraŭ leĝa ago mortpune kondamninda. Ni atendas pli precizajn novaĵojn koncerne la enkarcerigon, antaŭ ol iom precize raporti pri ĝi. Hodiaŭ ni simple citos el tiu neordinara letero, kiu rakontas pri absolute nekonataj faktoj. Ĝi komenciĝas tiel:

A.- "Mi estas juna ĉeroko, fraŭlo, kiu eldonas gazeton. Mi parolas la rapide pereantan ĉerokan lingvon. Mia hejmurbo estas Tahlequah, en Oklahomo, Usono, la ĉefurbo de la ĉeroka nacio. Dum du jaroj mi vojaĝis tra la esperantujo de Azio en Japanio, Koreujo, Filipinujo, Tajlando kaj Hong-kongo. Dum du jaroj mi aktivis en la esperantujo de Eŭropo en 14 landoj. Mi faris pli ol cent prelegojn ĉe esperantistaj grupoj tra la mondo. Mi prelegis interalie pri la ĉerokaj lingvo kaj historio. Mi laboris por esperanto en Afriko en Tangers, Maroko kaj Mombasa, Kenjo. En 1985 Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko elektis min por esti la ĉefo de usona junulara delegacio, kiu dum unu monato ekskursis tra Germanio kiel gastoj de la germana registaro survoje al la Universala Kongreso en Aŭgsburgo. Kia agrabla monato!

Cl.- Mi nun estas en malliberejo.

A.- daŭrigas Billy WALDON.

Cl.- Mi frontas mortpunon pro krimoj pri kiuj mi estas senkulpa. Detaloj pri ĉi tio aperos en mia gazeto La Ĉeroka Esperantisto.

A.- Kaj li tiel priskribas la aperontan gazeton:

Cl.- Ĉiu numero de la gazeto havos interalie:

A.- Unue: Ĉeroklingvan sekcion kun esperanta traduko, kiu estos io el la ĉeroklingva literaturo.

Cl.- Due: Sekcion pri la ĉeroka gramatiko kaj lingvistiko.

A.- Trie: Sekcion pri la ĉerokaj historio kaj kulturo.

Cl.- Kware: Rubrikon pri Poliespo.

A.- Kiam tiu Ĉeroka Esperantisto aperos kun tiuj rubrikoj, ni tre verŝajne malkovros mondon al ni absolute nekonata kaj fremda. Billy WALDSON rimarkis kelkajn interesajn karakterizaĵojn, kiuj estas komunaj kaj propraj al esperanto kaj al la ĉeroka, kaj li havas la profundan kredon, ke Zamenhof estis iel informita pri la karakterizaĵoj de lia indiana idiomo, la sola, kiu havis gazeton kaj skribitan literaturon. Li rakontas tion en kvazaŭ improvizita plurpaĝa letero, kiu ne havas precizan planon. Legante tiun dokumenton, oni sentas, ke ĝia verkinto ne tre nete distingas inter la objekte priskribeblaj faktoj kaj la onidiroj aŭ popularaj kredoj. Kaj kiel ofte okazas en konversacioj, li abrupte ŝanĝas la temon por raporti pri io tute alia. Kaj same neatendite li revenas al la forlasita rakontaĵo por ĝin daŭrigi. Tiu stilo donas vivantecon al lia raporto, sed samtempe iom malseriozigas ĝin, kio estas bedaŭrinda. Ni citu lin:

Cl.- Kiam Zamenhof prezentis esperanton al la mondo, Ĉerokujo estis sendependa nacio kiel Germanio aŭ Japanio. Iam Ĉerokujo estis tiel granda, ke nun 8 usonaj ŝtatoj okupas tiun terenon. Tiam la ĉerokoj loĝis en 60 urboj, 200 vilaĝoj kaj havis registaron multe pli demokratian, ol la posta usona. Ekzistis 4 dialektoj de la ĉeroka lingvo. Dialektanoj kun la konsonanto **R** pafmortiĝis far la blankuloj kaj la dialekto pereis. La ŝtato Virginio faris leĝon laŭ kiu blankulo mortiginta ĉerokon tuj ricevis 130 dolarojn (unu jaran salajron) je prezento de kaphaŭta hararo al marŝalo. Multaj blankuloj vivtenis sin tiel, murdante eĉ bebinonj...

A.- En la gazeto La Ĉeroka Esperantisto mi pritraktos la demandon: "Ĉu Zamenhof studis la ĉerokan lingvon? En 1828 aperis La Ĉeroka Fenikso, la unua indianlingva gazeto en la mondo. Ĉerokujo estis la sola nacio, kiu sendis sian gazeton senpage al malriĉaj civitanoj. La ĉeroka lingvo estis unu el la malmultaj lingvoj de la mondo kun presita literaturo. Ĉerokoj estas la sola indiana popolo kun propra skribsistemo. Ĝi estas silabaro inventita de SEQUOYAH (Sekvojo). Oni diras, ke li estis la sola homo en monda historio, kiu kreis skribsistemon por sia propra popolo.

Cl.- Dum la junaĝo de ZAMENHOF Ĉerokujo, Sekvojo, kaj La Ĉeroka Fenikso estis famkonataj aferoj en la mondo. [La Ĉeroka Fenikso](#) havis multajn abonantojn en Eŭropo. Eŭropaj ĵurnalismaj kaj lingvistikaj rondoj ŝatis havi kopiojn de ĝi. Presita en la sekvoja silabaro, kun partoj tradukitaj angle, ĝi estis la plej bona studilo por indiana polisinteza lingvo, kiu iam aperis ĝis tiam.

A.- En 1838 Usono invadis kaj metis la ĉerokojn en koncentrejojn. En la mezo de tre akra vintro la usona armeo devigis la ĉerokojn marŝi transkontinente en sovaĝejon, hodiaŭan Oklahomon. En tiu [Pado de Larmoj](#) unu kvarono de la popolo mortis. Preskaŭ ĉiuj maljunuloj, beboj kaj gravedaj virinoj mortis. Malsatmorto, frostiĝo kaj malsano regis. La usona armeo ĉirkaŭis kun pafiloj. Du verboj regis: marŝu aŭ mortu! Aŭtonomia Ĉerokujo denove ekestis kun Tahlequah kiel ĉefurbo.

Cl.- Kaj Billy WALDON iom rakontas pri si mem:

A.- En Tahlequah mi iris al elementa lernejo, mezlernejo kaj gimnazio. La instruado de la ĉerokaj lingvo kaj historio lerneje strikte kontraŭleĝis. Kontraŭleĝis eĉ por ni ĉerokoj elekti nian propran ĉefon.

Cl.- Kaj li revenas al lingvaj demandoj:

A.- Multaj profesoroj, doktoroj, lingvistoj kaj aliaj diraĉas, ke esperanto estas tro eŭroplingveca kaj tial netaŭga por esti justa monda interlingvo. La ĉeroka lingvo pruvas, ke ili eraras. Ili diras, ke ne ekzistas lingvo pli fremda al la ĉefaj eŭropaj lingvoj, ol la ĉeroka: ili pravas. Ili diras, ke la ĉeroka lingvistiko montras la netaŭgecon kaj nejustecon de esperanto pro granda fremdeco kaj malsameco de la ĉeroka: ili malpravas. Ili sufiĉe studis nek la ĉerokan, nek la esperantan.

Cl.- Ekzistas grandaj kaj gravaj similaĵoj inter la ĉeroka kaj esperanto. La ĉeroka lingvo klare montras la justecon kaj taŭgecon de esperanto kiel internacia lingvo. Se vi batalas por esperanto, nepre metu la ĉerokan argumenton en vian argumentaron!

A.- La venontan semajnon ni prezentos al vi la similaĵojn inter la ĉeroka kaj esperanto laŭ la letero de Billy WALDON, kiu estas konvinkita, ke ne la hazardo kaŭzis ilin.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND citis erojn el cirkulera letero anoncanta la naskiĝon de la gazeto *La Ĉeroka Esperantisto*. Ĝis reaŭdo!